

La bapto de la domoj Ernest Naville kaj Pierre Bovet
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-794/234, 1978 decembro 28, 30
http://www.esperanto-gacond.ch/radioprelegoj-mp3/Radioprelego_794_SRI_234_1978_12_28_30_La_bapto_de_la_domoj_Ernest_Naville_kaj_Pierre_Bovet.mp3

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

La unuan semajnfino de decembro mi prezidis kulturen semajnfino esperantistan, kiu restas inter la plej memorindaj esperanto-eventoj okazintaj en Svislando, Tiu ĉi renkontiĝo, kiu grupigis en la urbo La Chaux-de-Fonds pli ol 150 personojn, unuflanke celebris la dekan jaron de Kultura Centro Esperantista kaj aliflanke baptis la du unuajn domojn de Gastejo Edmond Privat.

A.- Estas tuj menciinde, ke la aranĝon karakterizis la dulingveco: la salutantoj kaj la prelegistoj sin esprimis en esperanto aŭ en la franca, kaj s-ro Claude Piron kun granda lerteco funkciis kiel interpretisto. Por eviti tiun ĉi temporaban rediron de la prelegoj en la alia lingvo la prelegoj estis skribe tradukitaj kaj la koncernen resumon oni disdonis al la aŭskultantoj, kiuj ne bone komprenis la lingvon uzatan de la parolanto.

Cl.- Malfermis la festparoladojn la prezidanto de Gastejo Edmond Privat, s-ro André Sandoz prezidinto de la urbo La Chaux-de-Fonds. Li memorigis la ĉefajn etapojn de la fondumo, kiun li gvidas kaj kies celo estas la akirado de 7 domoj por fari el ili veran Esperanto-kvartalon. Li emfazis la gravecon por la urbo La Chaux-de-Fonds de la ekstarto de la aktiveco de la ĵus fondita Internacia Fiera Altlernejo, kies provkursoj konis tute kontentigan sukceson malgraŭ preskaŭ nula informado.

A.- La direktoro de la publika instruado, s-ro Francis Matthey tuj poste alportis la salutojn kaj bondezirojn de la decidpovaj kaj plenumaj aŭtoritatoj komunumaj. Li rememorigis, ke la decido vendi 7 komunumajn domojn al la fondumo Gastejo Edmond Privat, post atenta studo, estis akceptita kun entuziasmo kaj unuanimeco de la decidpova "Conseil Général", kio ne estas ofta okazaĵo.

Cl.- La temo de la postaj paroladoj estis Ernest Naville kaj Pierre Bovet, ĉar iliajn nomojn elektis la fondumo Gastejo Edmond Privat por siaj du unuaj domoj. Pierre Hirsch, la prizorganto de la arkivejo Edmond Privat en la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds prezentis tre interesan portreton de la ĝeneva filozofo Ernest Naville. Kvankam ni ĵus finis la pasintan semajnon serion da radioprelegoj pri tiu ĉi pioniro de esperanto, ni legos al vi baldaŭ erojn el la esperanto-resumo de tiu ĉi tre interesa kontribuo.

A.- En la kunveno estis muntita tre bela ekspozicio pri Pierre Bovet, kiun la universitato de Ĝenevo pretigis por celebradi lian centjaran jubileon. Nun tiu ĉi ekspozicio kuŝas en la subtegmentejo de 1a domo Pierre Bovet, atendente la momenton, kiam ĝi povos esti daŭre ekspoziciita en bela prelegsalono. La biografio de Pierre Bovet, s-ro Samuel Roller, bedaŭrinde ne povis veni prezenti sian prelegon pro malsaniĝo kaj ĝian resumon laŭlegis Claude Piron. Ankaŭ tre bela kontribuado, kies esperantigon ni legos al vi, por ke vi ricevu ideon pri la esperanto-aktiveco de la patro de la aktiva pedagogio.

Cl.- Du filoj de Pierre Bovet konkludis tiun ĉi tre dignan posttagmezon, prezentante personajn rememorojn pri sia patro. Unue Daniel Bovet, kiu estas Nobel-premiito pri medicino kaj kuracisto en Romo, tre sprite skizis familiajn scenojn. El Sudfrancio venis la pastoro Jean-Jacques Bovet por paroli pri la filozofia kaj religia penso de sia patro. Oni sentis, ke li samideis, dum lia frato Daniel estis multe pli kritikema. Ankaŭ erojn el tiuj ĉi tre interesaj kontribuajoj ni legos al vi, kiam ilia esperantigo estos aperinta en Literatura Foiro.

A.- La vespero havis pli varian karakteron. Ĝin malfermis harpludado de Danielle Beguin kaj kantoj de Olivier Izaut kaj de liaj infanoj. Poste Claude Piron, la rektoro de Internacia FERIA Altlernejo, prezentis tre riĉan kontribuajon pri la temo "Esperanto, formo de humanismo". Ankaŭ el tiu ĉi teksto ni citos al vi erojn okaze de radio-prelego. Vi sciu, ke ĝi aperos en Internacia Pedagogia Revuo.

Cl.- La kursestro de Internacia FERIA Altlernejo, sinjoro Giorgio Silfer, kiu estas ĉefredaktoro de Literatura Foiro, poste tre interese prelegis pri la bezono por Esperanto de kultura ĉefurbo. La venontan semajnon ni resume prezentos al vi tiun ĉi tre densan kontribuajon. La publiko povis rimarki, ke la internacia feria altlernejo, kiu stariĝas en La Chaux-de-fonds, estas gvidata de kompetentaj profesoroj. Estas agrable, kiam oni festas la dekan, naskiĝaron de Kultura Centro Esperantista, konstati, ke kvazaŭ unupersona afero fariĝis en kelkaj jaroj la entrepreno de tre vigla kunlaborantaro. Kaj Giorgio Silfer apenaŭ troigis emfazante, ke eble kreiĝas en La Chaux-de-Fonds la ĝermo de kultura ĉefurbo de Esperantujo.

A.- Konkludis la vesperon teatraj kaj kantaj kontribuajoj de la trupo La Vagabondoj. Laŭ ni tiu ĉi ero estis la sola kritikinda parto de la programo. La Vagabondoj bedaŭrinde ne tre entuziasmigis la publikon pro sia tro diletanta kaj ne ĉiam tre bongusta programo.

Cl.- Kontraŭe la koncerto, kiu malfermis la dimanĉan programon, lasis al ĉiuj grandegan impreson. La profundbasulo Fred Stachel interpretis en esperanto-versio de Mad Mevo la tutan lideraron de Franz Schubert "Winterreise" kun tre lerta pianakompano de s-ino Lepetit. Ni tre esperas, ke en la kadro de la Universala Kongreso en Lucerno estos eble reaŭdi tiun ĉi koncerton.

A.- Tuj poste la esperantistaro veturis al la baptoj domoj, kie ilin atendis multaj personoj, inter kiuj la unua sekretario de la Instrudepartemento de la kanton Neuchâtel kaj la direktoro de la elementaj lernejoj de la urbo La Chaux-de-Fonds. Ambaŭ estis venintaj por gratuli nome de la instru-aŭtoritatoj la kuraĝulojn, kiuj dediĉis siajn fortojn al la kreo de fondumo, kies du unuaj domoj honoras ne nur gravajn pionirojn de esperanto kaj de politiko kaj pedagogio, sed ankaŭ la regionon.

Cl.- Dum Perla Martinelli kaj mi mem laŭtleĝis baptoj vortojn je la honoro de Pierre Bovet kaj Ernest Naville, laboristo fiksita la ŝildojn dekstre de la enirpordoj. Kaj tuj poste en la domo Ernest Naville tintis glasoj, el kiuj trinkiĝis ĉampanvino donacita de la urbo La Chaux-de-Fonds.

A.- La tagmanĝo, kiu sekvis estis tre ĝoja. Ĝi permesis danki la poetinon Mad Mevo, kiu fakte naskiĝis kaj vivis siajn ok unuajn jarojn en La Chaux-de-Fonds. Ni baldaŭ ŝin intervjuos, por ke ĉion tion vi pli bone sciu.

Cl.- La ceremonio konkludiĝis en la internacia horloĝmuzeo, kiu inaŭguris esperanto-komentarion. Saluti en esperanto la unuajn uzantojn de tiu ĉi informilo la notario de Gastejo Edmond Privat, s-ro Maurice Favre. Ankaŭ lin ni esperas intervjui, por ke vi ricevu impreson pri lia sprita bonhumoro.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Deziras al vi bonan novan jaron Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), decembro 2012*